# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA 4-a numero oktobro-decembro 1971

O VIETNAMI V ŘEVNICÍCH

Mírová sekce českého esperantského svazu ve spolupráci s Okresní mírovou radou Praha-Západ a ředitelstvím ZDŠ v Řevnicích uspořádaly v úterý 14. prosince 1971

BESEDU S VIETNAMSKÝMI PŘÁTELI,

která se konala y kreslírně zákl. devítileté školy v Řevnicích. O životě dětí ve své zemi a o jejich rodičích, kteří hrdinně brání svou vlast, vyprávěl malým účastníkům soudruh Pham Duong, ředitel Informačního a kulturního střediska VDR v Praze. Z besedy byly odeslány pozdravy žáků školy dětem ve Vietnamu a ostatních zemích Indočíny.

Před setkáním se žáky ZDŠ si vietnamští hosté prohlédli Městský národní výbor a pobesedovali zde s jeho funkcionáři a se zástupci MěV KSČ, Komunálních služeb a hospodářství Státního statku.

Na počest tvůrce esperanta

Pražští esperantisté vzpomněli 14. prosince ve svém klubu 112. výročí narození L. L. Z a m e n h o f a tradičního Dne esperantské knihy. Slavnostní projev přednesl při této příležitosti předseda EKP dr. R. Horský. Uměleckou část večera připravilo rumunské trio pod vedením paní V. Moraové.

KLUB ESPERANTISTŮ V PRAZE se schází každé úterý (19-21. hod) v ZK, Strojexport, Praha 1, Václavské nám. č. 56 (kino Blaník). Kromě obvyklého kursu pro začátečníky, vedeného již od 17. hod. J. Tomčíkem, pořádá klub další dva kursy : pro pokročilé (vede J. Králová) a konverzační (vede ing. E. Felix), vždy v úterý od 18. hod. tamtéž.

P e r s o n e

Sekretariino de EKP s-anino Lýdie K l e g o v á ĉesas funkcii ekde 1.1.1972 lige kun sia foriro el la posteno en ĈEA. La klubo dankas ŝin pro la farita laboro kaj deziras plenan sukceson en ŝia plua aktivado por Esperanto.

La 21-an de novembro forpasis en Kratohohy apud Hradec Králové d-ro Jan Filip, la konata ĉeĥa esperantisto, aŭtoro de la grandaj Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta vortaroj, el kiuj la unua estis eldonita en 1930, ĝia 2a eldono kaj la ĉ.-e. parto post la dua mondmilito. Laŭ sia amplekso ili ĝis nun ne estis superitaj.

La 6an de decembro ni rememoris la 70an datrevenon de la naskiĝo de nia karmemora Jaroslav Š u s t r , honora prezidanto de EKP, forpasinta en 1969.

---000---

NI PETAS ESTIMATAJN LEGANTOJN, ke ili bv. dediĉi sian atenten al la enketo proklamita en la 7a numero de STARTO kaj laŭeble plej amase respondu la respektivan demandaron !!!

K o r e k t o : Niaj legantoj bv. korekti la noton pri s-ro inĝ. L.D a n i e l en la 3a n-ro de "Bulteno" sur la 5a paĝo, kie anst. Poděbrady devis esti korekte P a r d u b i c e .

Kiu povas helpi? S-ro Masek R. el DDR, 5103, Neudietendorf, Ingerslebener Str. 3, intencas fari serion da bildoj pendontaj en la koridoro de iom granda klube-jo. Ili devus montrí kongresojn kun partoprenantoj (1), instruadon (2) kaj grupojn dei esperantistoj diverslandaj (3). Sro. Masek petas sendi por tiu kvalitajn negativojn 6x9 aŭ 6x6 cm, eventuale precizajn reproduktaĵojn de la jam ekzístantaj bildoj.

## P o k l a d n í   z p r á v a

Do tohoto posledního čísla roku vkládáme opět složenky a doufáme, že všichni, které jsme před časem upomenuli dopisem a složenkou, splní sviu členskou povinnost. Většina členů to již pochopila, bohužel ještě někteří členský příspěvek za rok 1971 dluží.

Žádáme ty, které snad už příslušnost k našemu hnutí nezajímá, aby nám své číslo vrátili, případně aby své rozhodnutí sdělili písemně. Děkujeme současně všem, kteří naše hnutí podporují.

Klubovní zpravodaj jsme dosud zasílali všem, avšak svazový časopis STARTO dostali jen ti, kteří vyrovnali členský příspěvek svazu. (V roce 1971 vyšlo celkem 8 čísel, které rozešleme všem, jakmile splní svou členskou povinnost). Do konce listopadu 1971 odvedl náš klub svazu členské příspěvky za 304 členy.

| | | |
|---|---|---|
| Příspěvky na rok 1972 zaplatí: | výdělečně činní | 68 Kčs |
| | důchodci, | 44 " |
| | studující | 34 " |

Nově přihlášení členové platí jednorázové zápisné plus 10 Kčs. Rodinní příslušnící a příznivci se stávájí členy za roční příspěvek 20 Kčs bez nároku na STARTO. Dosud nepřihlášení do svazu platí navíc 10 Kčs zápisného na legitimaci ČES.

Protože KE v Praze se stal místní skupinou ČES, je nyní povinností každého člena klubu, zakotvenou přímo ve stanovách, stát se i členem svazu a platit celkový členský příspěvek. Mimopražské esperantisty můžeme vést jen jako dárce (příznvce), pokud mají zájem dostávat klubovní zpravodaj.

S povděkem přijmeme dobrovolné dary, zvláště na tiskový fond. Děkujem za vaše pochopení a přejeme všem v novém roce pevné zdraví a mnoho úspěchů v práci.

Anna B á r o c h o v á , pokladní klubu

PROGRAMOJ DE EKP (januaro – marto 1972) (eventualaj ŝanĝoj rezervitaj)

| | | |
|---|---|---|
| 4.1. | inĝ. E. Felix | Pri la kreo de Esperantujo |
| 11.1. | | L i b e r a   t r i b u n o |
| 18.1. | Šperling – Kynčl | Niaj esperantistaj renkontiĝoj |
| 25.1. | T. Balda | La vespero de solidareco kun la batalanta Vjetnamio (kun ekspozicieto) |
| 1.2. | | L i b e r a   t r i b u n o |
| 8. 2. | inĝ. E. Felix | Pri la studo de lingvoj |
| 15.2. | A. Slanina | Retoriko en Esperanto |
| 22.2. | V. Echtner | Infanoj kaj Esperanto |
| 29.2. | arĥ. J. Drlík | La februara venko de la ĉs. laborista klaso (24-a datreveno). |
| 7.3. | junularo | J u n u l a r a   v e s p e r o |
| 14.3. | J. Tomčík | Kultura vespero |
| 21.3. | J. Trojanová-Bendová | D-ro Martin Luther King. Diskriminacio kaj la problemo de nigruloj |
| 28.3. | A. Šustrová | Historio de la Týn-preĝejo |

---

## Plibonigu vian lingvaĵon!

La Lingva Komisiono invitas ĉiujn ER kaj klubojn, ke ili elektu el siaj anoj la lingvan gardanton, ki-u zorgos :

1) ke oni profitigu ĉiujn kunvenojn kaj renkontiĝojn por praktikado de la lingvo,

2) ke ĉiu eraro, ĉefe tiu, kiu ripetiĝas, estu dece kaj delikáte korektita,

3) se li puŝos al malfacilaĵoj, ĉu societaj ĉu lingvaj, li turnu sin skribe aŭ persone al la sekr. de LK inĝ. E. Felix, Praha 3, U Vinohradské nemocnice 10, tel. 7377227.

---

KLUB ESPERANTISTŮ v Jablonci n. N. a KE v Liberci uspořádají ve dnech 29.-30.ledna 1972 na některé chatě v Jizerských horách seminář pro mladé esperantisty - začátečníky od 15 let. Náklady na celý pobyt asi 35 Kčs !!! Zájemci, pište již dnes na adresu: Klub esperantistů KASS, k rukám s. Jíry, p.schr. 190, Jablonec n. N. nebo: Klub esperantistů v Liberci, p. schr, 194, Liberec 1.

---

BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA. Aperas kvaronjare. Redaktas Oldřich Kníchal (respondeca redaktoro), inĝ. Eduard Felix kaj Jaroslav Mařík. Tiu ĉi numero aperis en januaro 1972.

## El la historio de Esperanto

Ankaŭ ni – en nia Klubo – devas konstante serĉi kaj uzadi novajn vojojn kaj rimedojn por povi sukcese puŝi nian aferon pli antaŭen. Ni devas uzi la instrumentojn adekvatajn por la nuntempo, por la epoko de cibernetiko kaj kosmonaŭtiko.

Ni ne estas kaj ne povas ekzisti kiel fermita societo! Kontraŭe, ni devas larĝe malfermi la pordon de nia Klubo al ĉiuj aplikeblaj kaj modernaj sciencaj metodoj kaj ideoj, kiuj povus fari nian klopodadon pli efika kaj sukcesa. Ni bonvenigu ĉiun, kiu interesiĝas pri Esperanto kaj volas ĝin progresigi. Ni devas konstante kaj pli urĝe prezenti la aferon de Esperanto al la loĝantoj de Praha, por ke ili sciu, ke ni estas ĉi tie, ke Esperanto vivas, ke ĝi funkcias kaj servas.

Prof. Ivo Lapenna akcentis en sia inaŭgura parolado ĉe la 55-a UK en Vieno, ke ni, esperantistoj, devas uzi en la nova epoko la novajn, modernajn kaj sciencajn metodojn por pluaj evoluo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo. Ni praktiku ilin en la internacia, landa kaj kluba skaloj!

Nia ĉefdelegito de UEA, inĝ. F. Sviták, jam kelkfoje dum niaj kunsidoj akcentis la gravecon de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de ties morala kaj materiala subteno. Dum multaj jaroj ni plendis pro manko de tutŝtata centra kaj oficiala Esperanto-organizaĵo. Jen, ĝi ekzistas. Estas ne nur nia devo, sed ankaŭ nia ĝojo kaj fiero aniĝi kaj ĉiaflanke subteni ĝin. Nur firme organizita movado povas sukcese plenumi siajn celojn!

Ankaŭ en nia Klubo ni jam aŭdis jenan, flankediritan plendon:

"Esperanto donadas al mi nenion; mi nur pagas, mi nur oferas, mi nur atendas ..."

Bedaŭrinda samideano! Li posedas tiom valoran instrumenton, sed li ne scias uzi ĝin.

Mi persone, same kiel plejmulto de vi, treege bedaŭras, ke Esperanto ne estis ĝis nun akceptita de Unuiĝintaj Nacioj kaj koncernaj registaroj kiel neŭtrala lingvo. . . Sed tiu ĉi fakto absolute ne faras min pesimisma kaj skeptika. Miaj personaj spertoj konvinkas min ĉiutage, ke eĉ en tia situacio kapabla, lerta kaj inteligenta esperantisto povas pere de Esperanto multegon gajni por sia spirita vivo!

Por tiuj, kiuj plendas, mi havas ununuran respondon: ĉiu esperantisto gajnas pere de Esperanto laŭ sia kapablo. Kaj la valoroj gajnitaj pere de Esperanto – estas vere nepageblaj!

Esperanto estas granda, nobla kaj mirinda afero. Ju pli da tempo kaj energio ni dediĉas al ĝi, des pli ni gajnas. Ne materiale, sed spirite.

Mi finu per kelkaj devizoj, kiujn mi opinias aktualaj kaj farendaj por ĉiu esperantisto:

Ellerni perfekte Esperanton!

Konstante porti la verdan stelon!

Ĉiuflanke subteni la Asoscion kaj UEA!
Kun esperantistoj paroli nur Esperante!
Gajni novajn seriozajn adeptojn!
Propagandi Esperanton per taŭgaj rimedoj!

Jaroslav Tomčík

(el la prelego en EK Praha la 31an de aŭgusto 1971)

<u>HOMA TRAGEDIO</u>

Mond' de mizero, doloro, perforto,
Mondo de sango, perfido, batal',
Ĉu nur ĉagreno, teruro kaj morto,
Ĉu nur malbon' estas via fatal'?
Hom' super ĉiuj kreitoj la krono,
Kvazaŭ reganto de l' tuta natur',
Kial vi uzas, anstataŭ por bono,
Vian racion kun nura terur'?
Kial, ho, hom', vi predikas la amon,
Bele rezonas pri paco kaj ver',
Kvankam vi dume praktikas malsamon,
Morton semante sur tuta la ter'?
Kial, ho kial ne estas konformo
Inter parolo kaj via agad'?
Ĉu hipokrito nur estas la normo
Vin instiganta al vortoparad'?
Jaro post jaro forpasas, lasante
Vundojn profundajn en korp' kaj anim';
Kaj senskrupule la homo konstante
Faras sin mem sia propra viktim'.
Ĉiun novjaron la homoj eniras,
Benon fidante por si kaj la frat';
Sed, ĉu la ben' kiun buŝo deziras,
Fontas el koro ? - Ho, duba agad'!
Ho, se la hom' liberigi sin povus
El konvencio, doktrino, erar',
Kiom pli ĝoja la vivon li trovas,
Sen la katenoj de prema dogmar'.
Kaj, se lin regus profunda kompreno,
Ke la sekreto de l' homa feliĉ'
Ne elmontriĝas el brua sinteno,
Sed en animo kun ama dediĉ'!
Tempon ne perdu, ho, fratoj, per diro:
Kia, laŭ via percept' estu mond',
Sed realigu laŭ propra inspiro
Pacon en vi kaj en propra la rond'.

G. J. Degenkamp

La aŭtoro estas konata nederlanda Esperanto-pioniro. Inter la du mondmilitoj li kontaktis ankaŭ kun la ĉeĥaj eminentuloj Kamarýt, Sklenčka, Šupichová k. a. Ellerninte la ĉeĥan lingvon G. J. Degenkamp tradukis en 1947 la libron de K. Čapek "Obrázky z Holandska".

Tradukas niaj legantoj
M. Konečná : Tie estas via feliĉ' .

Fileto mia, volu la gemojn lasi
kaj la fablojn libere pasi
La feliĉon ne gardas nun la drak',
Vojo al ĝi – diligenta la manplat'!

(el la ĉeĥa V. Lorenc)